10-a JARO, N-o 416 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. APRILO 1934

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 23, rue Boyer, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris: Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Leipzig n-o 85 148. Paris n-o 1234 22, Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT, bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « L. Bannier ».

Valencio, urbo de la XIV-a Sat-Kongreso

Socipolitika panoramo

La hispana Respubliko estis proklamita antaŭ tri jaroj meze de bruantaj ondegoj de entuziasmo k ĝojebrio. La monarkio ĝis tiam ankoraŭ reprezentis preskaŭ mezepokan reĝimon, sub kiu riĉaj sinjoroj k fieraj nobeloj estis, precipe en la kamparo, mastroj pri vivoj k honoroj. Nur en ĉefaj urboj, kie la industrio sufiĉe sukcese disvolviĝadis, aperis la proletaro, ne kiel konscia unueco, sed kiel konfuza amaso kun ribelemaj postuloj k fantaziaj revoj pri feliĉa, estonta — treege malproksima — vivo.

Valencio estis unu — eble plej karakteriza — el tiuj urboj, kie la etburĝaro kaj laboristaro unuiĝis sub la mistika kredo al la Respubliko, kies starigo farus la miraklon, iel ajn, — pri tio oni ja ne havis opinion — solvi ĉiujn malagrablaĵojn k forigi la mizerojn de la modestaj tavoloj de la popolo.

Sciencaj, modernaj revoluciulaj teorioj tute ne ekzistis. La vorto respublikano entenis ideon pri homo preta fari revolucion, detruanta, se necese, ĉion ekzistantan, por krei justan sociordon, sen emo nek malemo, ĉu tio povus havi similon kun socialismo, komunismo aŭ ia ajn plia socia tendenco.

Estis escepto en tiu ĉi distribuo la anarkistoj, kiuj laŭ sia klasika taktiko persiste agadis, organizitaj en kelkaj grupetoj, k influadis sufiĉe, almenaŭ teorie, sur kelkajn sindikatojn.

La Granda milito kaj la rusa Revolucio havis la efikon ĉi tie, kiel en multaj aliaj lokoj, naski, kvankam amorfan, ian klaskonscion k pli celtrafan ribelemon.

Aperis, forta k aroga, sana k potenca, la Nacia Konfederacio de Laboro, kiu sukcesis grupigi ĉirkaŭ si la grandan plimulton el la urba proletaro. Dum pluaj kelkaj jaroj tiu organizo absolute kontrolis k gvidis la ekonomian vivon de la urbo.

Tamen la fakto, ke ĝi emfaze malŝatis la politikon k tute ne donis edukon al siaj membroj pri la klasaj nuancoj inter burĝaro k proletaro por senĉesa klasbatalado, havis kiel sekvon daŭrigi konfuzan staton, ĉar samtempe la laboristaro kuraĝe batalis *sindikate* kontraŭ siaj mastroj, k harmonie agis kun ili *politike* en respublikanaj, tute burĝaj partioj kun demagogaj aŭ trivialaj devizoj kiel etikedo.

Tial okazis, ke malgraŭ grandaj penoj, post multa propagando, la Socialista Partio estis nur modesta societo en modesta strato. Pri komunismo, oni povis montri ĝian ekziston nur per la disvendado de kelkaj dekoj da ekzempleroj de ĝia tiutempa semajna gazeto.

La sonĝo fariĝis realo k la Respubliko ne plu estis revo, sed fakto, kiu tre multe helpis por heligi la situacion. Post la unuaj konstatoj aperis la unuaj disreviĝoj... k per propra sperto la simplaj laboristoj komencis lerni facile la klasbatalon, afero tiel malfacile lernigebla nur kelkajn monatojn antaŭe.

La Aŭtonomista respublikana partio — fondita de Blasko Ibanez — ankoraŭ havas grandan plimulton en la urbestraro, ĉar kompreneble ankoraŭ donas al ĝi siajn voĉojn multaj laboristoj, kio devigas ĝin agi tre zorge, kvazaŭ favore al modestuloj, por konservi la ŝajnojn.

La Socialista Partio havas jam influon k simpation precipe inter la oficistaro. Gravaj sindikatoj apartenas al ĝia Nacia Sindikata organizo. Dum lasta balotado ĝi akiris kun respublikanaj partioj 22.000 voĉojn.

La oficiala kompartio jam ne plu estas sekto por la popolo, sed vigla batalanto, kiu aŭdigas sian voĉon en amaskunvenoj k sindikataj aranĝoj k grupigas, sub la konata signo de martelo k falĉilo, klerajn k bonvolemajn junajn gelaboristojn. Dum la lastaj balotoj ĝi luktis sola k akiris 3.000 voĉojn.

La Nacia Konfederacio de Laboro ankaŭ suferis la skuojn de nia epoko. Okazis grava skismo inter la du tendencoj, anarkismo k sindikatismo, kiuj amike kunvivadis ĝis nun. Ĉiu tendenco estras nun siajn proprajn sindikatojn.

La faŝismo en Valencio, laŭ urba amplekso, ne estas timinda, sed ne tiel laŭ tutlanda vidpunkto. Antaŭ nelonge ekstaris la Laborista Interligo kontraŭfaŝisma, kiu havas antaŭ si grandan taskon, kiun ĝi povas sukcese plenumi, ĉar ne mankas la simpatio k la helpo de preskaŭ la tuta urbproletaro.

La ĉefaj sindikatoj tre favore k helpeme atentas la gravan signifon de esperanto kiel internacia interligilo. La Grupo Laborista Esperantista fondiĝis en sindikato mem k daŭrigis sian vivon sub la varto de alia proleta organizo.

Nuntempe nia Grupo estas grava societo en la urbo k ĝuas bonan hejmon, kiu estas propre luita nesto kun vastaj ĉambroj, kie ĉiutage svarmas viglaj diskutoj, amikaj konversacioj en nia lingvo, dum oni atendas la horon por komenci la kursojn.

Kelkaj sindikatoj esprimis siajn dezirojn helpi morale k materie la Kongreson k akcepti viziton de kongresanoj.

Nia XIV-a estos broĉo, kiu plene internaciigos la urbon k klaskonsciigos kulture k praktike la valenciajn laboristojn. Kaj la proleta historio de nia urbo mencios la rolon de esperanto kaj SAT, ne kiel banalan okazintaĵon, postlasinta nenian signon, kiel lumradio tra kristalo, sed oni diros prave, ke nia kunveno internacia faris sulkon, kien oni metis semon, kiu certe fruktiĝos por ĉiama rememoro pri la universala vizito de amase venintaj Gek-doj.

Ĉiu proleta kongresano povos fieri pro tio, ke li kvazaŭ skribos paĝon por la historio de la nuna Valencio.

K-do leganto, estu vi unu el tiuj !

Luis Hernandez.

La Simbolo de Majo

Kaj junaj, maljunaj en sama la vic',
Ni marŝas al nova aŭror'...

La poeto parolas iafoje pri la « Juna Majo ». La epiteto « Juna» estas vere karakteriza por tiu monato, en kiu burĝonas arboj k floras herbejoj. Ĉi tiu epiteto ŝajnas al mi ligita ankaŭ kun la festo- k bataltago de la tutmonda Laboristaro. Ĉu ni povus mezuri la animan impreson ricevatan, se en tiu tago, kiun elektis la laborista popolo kiel simbolon por la internacieco de sia movado k por impona elmontrado de sia prometea forto, manifestacius tra stratoj k aleoj nur plenaĝuloj... ?

Estas ja vero en tio, ke movado manifestas sian vivrajton k vivoforton plej konvinke k plej imprese per tio, ke en ĝiaj vicoj partoprenas amase gejunuloj, kun radiantaj vizaĝoj, mienoj, sur kiuj speguliĝas kun la esperoj, kun la promesoj la certo pri pli luma, pli libera estonto !

Mi opinias nekonvene plenigi multe da linioj en nia malgranda gazeto, kies spaco devas servi al la urĝaj k gravaj taskoj de la Asocio k de la lab. esp. movado, per pli malpli sterilaj konsideroj pri la Tago de la Internacia Solidaro k Frateco, kia estas laŭtradicie la Unua de Majo. Pli grave ŝajnas al mi, ke ni ĉiuj, SAT-anoj, laboristaj esperantistoj, per nia praktika laboro, nia ĉiutaga sennacieca k solidareca agado donu formon, valoron k signifon al la institucio de la Ruĝa Majo. Tio havas multe pli da pezo ol ajna efemera manifestacio... ol verva parolado ĉe festa kunveno....

En alia loko de ĉi tiu n-ro la K-doj trovos raporteton k versaĵon pri Junulara movado. Al ĝi mi volus rilatigi la liniojn ĉi supre skribitajn. Mi opinias, ke tiu raporteto pri la Junaj Agloj povus servi al ni por edifo, pripenso k kuraĝigo en la tago de l'Unua de Majo !

Vivu la Unua de Majo ! Vivu la Internacia Solidaro !

N. B.

La « Plena Vortaro » kiel studilo

La vortaro estas la plej bona, la plej havinda libro ; ĝi entenas ĉiujn aliajn librojn ; sufiĉas nur, ke la studanto sciu eltiri ilin. *Anatol Frans.*

Por bone lerni fremdan lingvon, oni bezonas i.a. vortaron. Kvankam en esperanto pro ĝia simpla sistemo de vortfarado oni povas facile mem konstrui multajn vortojn, tamen ankaŭ por la lernanto k eĉ por la uzanto de ĉi tiu lingvo vortaro estas nepre necesa. La komenca studanto uzas ĝenerale vortarojn esp.-nacilingvan k nacilingva-esp.-an. Sed por tiu, kiu volas funde lerni la lingvon, kiu volas enpenetri en ĝia idiomaĵo, en ĝia spirito, la dulingvaj vortaroj ne sufiĉas. Li bezonas ankoraŭ ion alian, nome : vortaron tute esperant-lingvan. Tia vortaro estas la « Plena Vortaro de Esperanto », eldonita de SAT[1].

Pro kio la Plena Vortaro estas tiel necesa, tiel grava por ĉiu esperantisto ?

Ĝia granda valoro konsistas ne el tio, ke ĝi eble enhavas pli da vortoj ol iuj dulingvaj vortaroj. Ĉar ankaŭ la « Plena Vortaro » ne estas tute kompleta. Ĝiaj avantaĝoj estas aliaj.

Okazas foje, ke por traduki iun vorton (ideon) en alian lingvon, en tiu koncerna lingvo ne ekzistas tute ekvivalenta esprimo, kun precize sama signifo, Pro tio la difinoj, kiujn donas la dulingvaj vortaroj, ne estas ĉiam tute ĝustaj, sed nur proksimumaj. En tiaj okazoj la « Plena Vortaro » per siaj esperantlingvaj difinoj informas pri la ĝusta signifo. Se iu radiko havas pli ol unu signifon, ankaŭ pri la ceteraj, pri la nuancoj de la ĉefa signifo, oni trovas difinon. Ĉe preskaŭ ĉiuj vortoj troviĝas krom la difino, multaj ekzemplaj frazoj, ĉu de Zamenhof, ĉu de aliaj aŭtoroj, kiuj ilustras la donitan difinon. Pri la signifo de la vortoj, kiam ili estas en figura senco, difinoj k ekzemploj ne mankas. Ankaŭ pri la uzado de la afiksoj, de la prepozicioj k de ĉiuj aliaj lingvo-elementoj la « Plena Vortaro » donas tre utilajn klarigojn kun sennombraj ekzemploj. Krom la vortoj el la komuna lingvo ĝi enhavas la plej uzatajn sciencajn vortojn. Kaj fine oni povas ekscii el ĝi, kiuj vortoj estas oficialaj aŭ ne, kiuj verboj estas transitivaj k kiuj ne, ktp.

La « Plena Vortaro » do ne estas nur simpla vortlisto kun esperantlingvaj difinoj, kiun oni uzas dum legado aŭ tradukado, renkontinte nekonatan vorton. Ĝi estas multe pli. Ĝia riĉa enhavo, ĝiaj klaraj difinoj, ĝia abundo da ekzemploj estigas la « Plena Vortaro »-n studilo unuaranga. Ĉiu, kiu volas tutplene proprigi al si la lingvon, ĉiu, kiu skribas aŭ tradukas en esperanto, eĉ tiu, kiu nur legas k parolas la lingvon, posedu la « Plena Vortaro »-n k havu ĝin ĉiam en sia proksimo por tuja konsulto.

G. P. de Bruin.

[1] La Dua, multe plibonigita eldono aperos en majo. — *Red.*

ĈE LA LABORISTAJ ESPERANTO-ASOCIOJ

La 14-a Kongreso de F.E.O.[1]

Ĉi tiu Kongreso, kiun partoprenis proks. 60 Gek-doj, okazis la 1-an k 2-an de aprilo en *Parizo*, en « Palais de la Mutualité » (Reciprokhelpa Palaco). Prezidis K-doj Platiel k Peletje ; protokolis K-do Kaŝon. 16 grupoj estis reprezentitaj ĉe la kongreso, kelkaj aliaj sendis mandatojn. La raportoj de la federacia estraro, *a*) de la sekretario k propagandkomisiito, *b*) de la kasisto k libristo, *c*) de la gvidanto de l'perkoresponda kurso, estis *unuanime aprobataj* post sufiĉe longdaŭra k multflanka debato, en kiu estis klarigataj la kaŭzoj de la mankoj en la funkciado de la asocia aparato dum la lasta jaro (pokrasta livero de la asocia gazeto, nekontentiga funkciado de la propaganda fako, nesufiĉa kontakto inter estraro k lokaj grupoj, manko de bilanco, ktp). El la raporto ni notas, ke fine de 1933 la asocio havis 633 membrojn (el ili 505 en Francio, 108 en Belgio, 20 en Svisio). Sed intertempe aliĝis 5 novaj grupoj kun sume proks. 80 membroj, tiel ke la membronombro transpasas nuntempe 700. La stato estas sama kiel antaŭjare (la suma nombro superas nur negrave tiun de l'antaŭjaro).

Estis akceptataj proponoj rilate la ordigon de l'gazet-ekspedo k normaligon de la laboro de la propagandkomisiito ; okazis ankaŭ debato pri la eventuala malcentrigo de la librofako, per kreo de provincaj deponejoj. Krome per plimulto akceptata estis deziresprimo pri interrilato kun la estraro de SAT koncerne la eblon de starigo de hejmo komuna kun deĵoranto, kie oni povus renkontiĝi por la plenumo de asociaj laboroj k por fari kunsidojn, sed je la kondiĉo, ke tiu paŝo ne necesigas salajratan oficiston.

La kongreso akceptis ankaŭ proponon prezentatan al la lernolibra komisiono, kiu celas la eldonon, flanke de la nuna ampleksa k kompleta kurslibro, de facila elementa lernolibro taŭga por la parolaj kursoj.

La kongreso akceptis unuanime rezolucion, kiu atentigas pri la nuntempa minaco de l'faŝismo en la tuta mondo k pri la neceso, ke la esperantistoj, kiuj sentas sin kontraŭfaŝistoj, aliĝu en FEO k ne restu en neŭtralaj esp. unuiĝoj. *Parizo* estis reelektata kiel sidejo de FEO. Kiel asocia sekretario estis reelektata (unuanime) K-do *Bubo*. La venont-

[1] LEA por la franclingvaj regionoj.

jaran kongreson akceptis organizi *Marsejo* kun la helpo de la K-doj el *Solies-Ponlo*, urbeto troviĝanta en la sama regiono.

La 2. aprilo posttagmeze ekskurso al *Versajo* unuigis multajn kongresanojn.

La Kongreso de la Nederl. Federacio de Lab. Esperantistoj

Kvankam ni ne ankoraŭ ricevis ĝis pretigo de ĉi tiu n-ro rektan raporton de niaj K-doj, ni jam povas doni kelkajn informojn pri tiu ĉi Kongreso dank'al raporto aperinta en la ned. socialdem. ĉeforgano « La Popolo » (Het Volk). La gazeto havis ĉe la kongreso sian propran raportiston. — *Red.*

Estis 600 partoprenantoj ĉe la Kongreso, kiu okazis en *Antverpeno* komence de aprilo (ĉefe venintaj el Nederlando). La urbestraro akceptis oficiale la kongresanojn en la urbdomo, kie la reprezentanto de l'ĉefurbestro, Huysmans, salutparolis, laŭdante esp-on kiel trafan rimedon por atingi la interfratiĝon de l'popoloj. La kongreso aprobis la agadraportojn de l'estraro (vd. en « S-ulo » n-o 415). Salutparolis ĉe la kongreso ankaŭ Antverpena sindikata sekretario Laroŝ (Laroche) k por la Antverpenaj gastigantoj K-do Willekens.

K-do Lanti parolis en la dua tago pri « Absolutismo »; li konstatis la mankon de ĉia penslibero en landoj, kie regas diktatoroj, k insistis pri la neceso, per disvastigo de esp-o kunhelpi por kontraŭbatali la ŝovinismon.

SAT-grupo en Polio.

Al la informo aperinta pri tiu nova organizo en la lasta n-o de « S-ulo » ni aldonas laŭ peto de la sekretario, ke jam delonge ne plu ekzistas la *Laborista Esp. Asocio « Laboro »*, kies nomo estas presita en la nunjara SAT-Jarlibro (paĝo 6). La K-doj, kiuj iam gvidis tiun Asocion, estas hodiaŭ inter la gvidantoj de « SAT-grupo en Polio » k Socialista Esp. Asocio.

Ĉina laborista gvidanto pri esperanto.

La redaktoro de « La Vivo », la plej multelegata semajna gazeto en Ĉinio, kiu heroe batalas por la intereso de l'amasoj k kies eldonkvanto estis pli ol 150.000 antaŭ unu jaro (pro registara malpermeso ĝi cirkulas nun 70.000-ekzemplere), esprimis sian opinion pri esp-o jene :

« Jam estas ne diskutinde, ke esp-o estas la sola vojo al la solvo de la problemo de internacia lingvo. Demando estas, kial esp-o ne povas fariĝi ĝis nun lingvo devige instruata en lernejoj, k aplikata de ĉiulandaj registaroj. La imperiistoj, tute ne volante la interkompreniĝon de l'popoloj, esence ne volas esp-on ; k la reganta klaso en la kolonioj, duonkolonioj, sklaveme edukita k servanta al la imperiistoj, preferas, ke la nacia lingvo de imperiistaj landoj fariĝu la lingvo internacia. Jen la kaŭzo, kial esp-o ne povas sufiĉe disvastiĝi. Sed, kvankam la imperiistoj k iliaj lakeoj ne volas internacian lingvon, la amasoj ĝin bezonegas, precipe la tutmondaj laboristoj bezonas esp-on kiel ilon por unuigi tutmondajn fratojn. Do, la esp-movado povas progresi nur paŝon post paŝo kun tiu de l'laboristoj. »

Laŭ « Mondo » (Ŝanhajo), dec.



14-a Kongreso de SAT

en Valencio (Hispanio)

3.-8. aŭgusto 1934.

3-a listo de aliĝintoj.

101 K-do Korn. v. Gink, Schiedam (Nederl.)
102 » Belaud H., St. Nazaire (Francio)
103 » E. Payen, Anzin (Francio)
104 » Ant. Roig, Barcelono (Hisp.)
105 » Joh. Oleart, Barcelono (Hisp.)
106 Delegitaro Hisp. Ligo Fervojistoj, Gerono (Hisp.)
107 Nova Voja SAT-Grupo, Lisbono (Portug.)
108 K-do Folkert J. de Jong, Sneek (Nederl)
109 » Gjalt de Jong, Amsterdamo (Nederl.)
110 » Kornelis G. J. de Jong, Amsterdamo (Nederl.)
111 » Antoon Eijkenaar, Zwolle (Nederl.)
112 » Dirk Versluis, Zwolle (Nederl.)
113 Jan Lievestro, Zwolle (Nederl.)
114 » Fr. Azorin, Kordobo (Hisp.)
115 » Daniel Lloréns, Valencio (Hisp.)
116 » Fern. Carvela, Lisbono (Portug.)
117 » Gastao de Moura, Lisbono (Portug.)
118 » J. M. Kerr, Denver (Usono)
119 » M. M. Weber, Denver (Usono)
120 » M. Auberger, Parizo (Francio)
121 » Fr. Casamayor, Valencio (Hisp.)
122 » Ramon Soler Sempere, Murcio (Hisp.)
123 » Frans Ten Hagen, Amsterdamo (Nederl.)
124 » H. Isnard, Marseljo (Francio)
125 K-dino M. Goedejohan, Roterdamo (Nederl.)
126 » S. Goedejohan, Roterdamo (Nederl.
127 » L. Goedejohan, Roterdamo (Nederl.
128 K-do H. Hendriks, Roterdamo (Nederl.)
129 K-dino Sj. Barendregt, Roterdamo (Nederl.
130 » L. Barendregt, Roterdamo (Nederl.)
131 K-do A. de Vries, Amsterdamo (Nederl)
132 » M. Medema, Buinen (Nederl.)
133 » J. v. D. Heeg, Bussum (Nederl.)
134 K-dino M. v. D. Heeg, Bussum (Nederl.)
135 » C. Helleman, Alkmaar (Nederl.)
136 » N. Schitenmaker, Oosthuizen (Nederl.)
137 » C. Lankelma, Purmerend (Nederl.)
138 » A. Siemer, Purmerend (Nederl.)
139 K-do J. Slavenburg, Apeldoorn (Nederl.)
140 K-dino R. Wegerif, Purmerend (Nederl.)
141 » E. Bourgonje, Purmerend, (Nederl.)
142 » P. Breeuwsma, Oudendijk (Nederl.)
143 K-do J. Frielink, Nord-Scharwoude (Nederl.)
144 K-dino E. A. Frielink, Nord-Scharwoude (Nederl.)
145 » W. Frielink, Nord-Scharwoude (Nederl.)
146 K-do A. v. D. Velde, Arnhemo (Nederl.)
147 » J. v. D. Velde, Arnhemo (Nederl.)
148 » W. Bant, Beets N. H. (Nederl.)
149 K-dino A. Swart, Beets N. H. (Nederl.)
150 » M. Tromper, Roterdamo, (Nederl.)
151 K-do Jb. Koomen, Assendelft (Nederl.)
152 K-dino D. Slootweg, Huizen (Nederl.)
153 » Slootweg Ruizedaal, Huizen (Nederl.)
154 » E. Gans, Amsterdamo (Nederl.)
155 K-do M. J. Oele, Den Burg (Nederl.)
156 K-dino J. Oele, Den Burg (Nederl.)
157 K-do A. E. Nientker, Amsterdamo (Nederl.)
158 K-dino P. E. L. Nientker Visser, Amsterdamo (Nederl.)
159 » S. Frank, Gasselte (Nederl.)
160 » W. Gardien, Roterdamo (Nederl.)
161 K-do C. v. D. Vlist, Roterdamo (Nederl.)
162 K-dino D. Vlist-Spek, Roterdamo (Nederl.)
163 K-do F. J. v. Gerven, Roterdamo (Nederl.)
164 K-dino E. v. Gerven, Roterdamo (Nederl.)
165 K-do A. Henstra, Arnhemo (Nederl.)
166 K-dino M. Hoogendijk, Amsterdamo (Nederl.)
167 K-do G. Cool, Voorburg (Nederl.)
168 » J. P. Rosseel, Den Haag (Nederl.)
169 K-dino E. Rosseel, Den Haag (Nederl.)
170 K-do C. J. v. Veenendaal, West-Graftdijk (Nederl.)
171 K-dino E. v. Veenendaal, West-Graftdijk (Nederl.)
172 K-do C. Emmerig, Krommenie (Nederl.)
173 » Johano Figueras, San Estebano (Hisp.)
174 » Domingos dos Santos, Angra do Heroismo (Portug.)
175 « Nia Gazeto », Nice (Francio).

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Nia Gazeto.

Tiel nomiĝas nova monatajo, nova frukto sur la esperanto-arbo. Pri ĝia neceso k utilo en niaj kolonoj diskuti, ŝajnas al ni superflue. Kelkaj diros : Jes, ĝuste tia gazeto ankoraŭ mankis al ni ; Teo Jung sendube apartenos al tiuj, kiuj ne rekonos la vivrajton de l'nova sintrudulo.

Por karakterizi « N. G. », ni diru, *a*) pri la aspekto : ĝi estas grandformata k presita sur aŭtentika ordinara rotacia gazetpapero ; *b*) pri la tendenco : ĝi estas la eldonajo de l'« interna ideo »-anoj. Ni povas juĝi nur pri la du n-oj ĝis nun aperintaj, kompreneble. Ĉar ja komparo trudiĝas, ni diru, ke ni trovas ĝin pli riĉenhava k pli lerte redaktita ol la produkton de Jung.

Lingve la gazeto sin prezentas bone prizorgita ; precipe interesis min konstati la tendencon esperantigi la proprajn nomojn. Eĉ se tiu esp-igo ankoraŭ ne estas komplete aplikita k eble ne ĉiam tute trafe, tiu elpaŝo mem meritas aprobon. Se ĝia apero signifas plifortiĝon de la neŭtrala esp. movado, malbona kritiko ne estus pravigebla. Ja kiel lab. esp-isto mi tute ne malkontentas, se la lingvo disvolviĝas k prosperas en neklasbatalaj medioj (kvankam mi ne havas iluziojn pri iama definitiva triumfo de esp-o en tiuj rondoj).

La aŭstria problemo

estas pritraktata en la esp-lingvaj komunikoj por la gazetaro de la Internacia Transportlab. Federacio. Ni citas nur la konkludon : « Estas tre malfacile antaŭdiri la proksiman evoluon en Aŭstrio. Ĉiutage povas veni surprizo. De diversaj lokoj oni raportas, ke la aŭstriaj laboristoj deziras en batalo inter Dolfus k Hitler la sukceson al la lasta. La kaŭzo estas malamo al Dolfus k la espero, ke post venko de Hitler en Aŭstrio venos milito, kiun oni juĝas sola eliro

el la faŝismo. Oni nur timas, ke ambaŭ interkonsentos. Ĝenerale oni opinias, ke Dolfus ne povos agi tiom brutece kiel Hitler, ĉar 1) la socialisma ideo estas en Aŭstrio pli firma ol en Germanio, 2) la registaro devas konsideri la provojn de Hitler, gajni la laboristojn, 3) pro influo el eksterlando. La K-doj, kiuj kompreneble nenion legis en la aŭstria gazetaro pri la solidaro de la internacia laboristaro, estis tre kortuŝitaj, kiam ili aŭdis pri la simpatio de la eksterlandaj laboristoj al ilia agado. »

La enfiltriĝo de esperanto en Svedio

estas tre klare videbla per la legado de la bone prezentita « Svenska Arbetar-Esperantisten » (la gazeto de la sveda LEA). En la marta n-o K-do *Aarse*, esp. instruisto el Nederlando, kursgvidanto en Svedio, rakontas pri siaj spertoj kun svedaj infanoj. Interesaj estas kelkaj konstatoj pri instruado : « ... la infanoj lernas klare distingi la diversajn gramatikajn ideojn : substantivo, adverbo, adjektivo, infinitivo, transitiva verbo, ĉar tiuj ideoj havas en esp-o klaran diferencon k oni ne bezonas teorian paroladon. » Ankaŭ estas artikolo pri esp-o inter blinduloj. La « kroniko » estas tre riĉa k atestas pri la ĉiuloka vigla moviĝado de l'lab. esp. grupoj.

N. B.

Religio en la servo de l'naciismo.

La ĉefredaktoro de *Oomoto Internacia*, s-ro Niŝimura, kutimiĝas skribi sur la unua paĝo de sia revuo fervorajn « epistolojn » pri la japana naciismo. La japana naciismo havas specialan aspekton — li opinias : « ... Japanio ne deziras superregi aliajn landojn, la celo de la japana naciismo estas defenda, ne ataka ; ni postulas, ke oni traktu nin kiel egalulojn en la familio de l'nacioj, ke oni respektu niajn *rajtojn...* » — La *rajton*, ekz., havigi al si parton de la rabajo forprenitan el la senpotenca Ĉinio. Niŝimura nomas tion « grandioza klopodo flanke de Japanio k la popolo de Manĉukuo por la starigo de paco k ordo en la Malproksima Oriento ». Timante ke ĉio finfine rezultigos grandan militon, li esperas, « ke tiu terura milito — precipe ĥemia — okazos nur sur spirita kampo. »

Ĥemia milito sur spirita kampo — komprenu tiu, kiu kapablas.

La Aŭstria Esperanto-Asocio deziras « heredi ».

« Aŭstria Esperantisto » n-o 3 publikigas alvokon de AEA, kiu invitas la membrojn de ALLE per la vortoj : « Nun ni eniru novan epokon, ĉiuj kune ! » al intima kunlaboro kun la burĝa organizo. *La nova epoko* estas tiu de teroro kontraŭ la socialistoj, aplaŭdita de AEA, kiu dankis al buĉisto Dolfus pro la « Savo de la patrio ». Al invito de la Patriota Fronto aliĝi al ĝi, la Aŭstria Esperanto-Asocio respondis : « Ni volonte sekvas tiun peton. »

La prezidanto esperas, ke li havos la taskon likvidi ALLE, ricevante per tio la adresliston de la ALLE-membroj. Li ankaŭ esperas, ke la nove fondotaj grupoj povu utiligi la iamajn ejojn de ALLE.

H. P.

El letero de germana Kamarado...

La plej nova formacio en nia urbo estas la t.n. « popolservo ».

Ĉiuj senlaboruloj subvenciataj de la urbo, de la 25-a ĝis 50-a vivjaro, devas esti en tiu ĉi « popolservo ». La laborservo daŭras 5 horojn potage k 5 tagojn posemajne. La « popolservanto » ricevas krom la subvencio tagmanĝon k matenmanĝon. Matene je la 9-a komenciĝas la servo. Je la deka k duono oni manĝas la matenmanĝon (pano k fromaĝo aŭ kolbaso kun kafo). Je la 13-a oni tagmanĝas, pli malpli bone. La laboristoj estas devigataj marŝekzercadi. Pensu, la iamaj socialdemokratoj k komunistoj marŝas kune, flankitaj de nacisocialistoj ! Antaŭ du jaroj ili ne povis fari tion ! Sed nun ili devas. La sola bona flanko estas, ke la Gekdoj povas paroli inter si....

Por ŝtopi la Breĉon

29. listo

Sennaciisto el Stalinio	50	fr. fr.
F.L. (18 155), Amsterdamo	2.50	guld.
1618, Buenos Ajres	0.96	peso
1533 (Aŭstrio)	2.—	ŝil. aŭstr.

DISKUTEJO

Pri la internacia ligo de Grafiklaboristoj

Mi deziras konigi mian opinion pri la alvoko de la « Esperanta Sekcio de Grafikaj Laboristoj » el Zagreb, kiu aperis en « S-ulo » n-o 414, pri fondo de Internacia Grafika Esp-ista Ligo. Mi konsentas ĝenerale pri la proponita programo : ja utilus, ke la esp-istaj grafikaj laboristoj el diversaj landoj rilatu inter si, celante propagandi esp-on en la grafikaj rondoj, ĉefe montrante la praktikan valoron de esp-o al la grafikaj laboristoj per praktikaj servoj al ties organizoj.

Sed anstataŭ fondi memstaran ligon, kial ne starigi en SAT sekcion de grafikaj laboristoj ? Tio instigus ĉi tiujn aliĝi al SAT. Estus la plej bona maniero « klerigi ilin pri la laborista movado », ĉar ĝuste nia asocio celas la klerigadon de la tutmonda laboristaro. La senperaj rilatoj inter grafikaj gelaboristoj k malsammetianoj estas atentinda klerigilo.

Se la fondota ligo estas memstara, oni povas timi, ke ties membroj ne sentos la neceson aliĝi al alia esp. organizo. Tiu apartiĝo povos, se ĝi estos imitata de aliaj metianoj, konduki al malfortigo de SAT ; k en la nuna stato de la esp. movado, nia asocio estas nepre necesa por plenumi taskojn, kiujn fakaj asocioj ne povas plenumi. Ĉi lastaj do funkciu en la kadro de SAT, kiel sekcioj. Tiel ni agos, por unuecigi nian movadon.

Tiuj linioj esprimas ne nur mian opinion, sed ankaŭ tiun de Parizaj sammetianoj. Ni dezirus koni la opinion de aliaj K-doj.

H. Cachon (24), tipografisto.

Esperanto en la servo de kalumnio

La germanaj burĝaj esperantistoj deziras servuteme pruvi la taŭgecon de internacia lingvo por disvastigi la evangelion de malamo, de ekstrema subpremo al ĉia opinio diferenca al la en Germanio reganta, de ekstermo fizika al ĉiuj kontraŭuloj. Ili do dissendis foliaĉon, kiu enhavas la sekvantan sekrecion de ilia malica animo :

« Frankfurt a-M. en Germanlando, marto 1934.

« Tre estimataj geesp-istoj en eksterlando.

Vi legas vian enlandan gazeton ; ĝi raportas certe ankaŭ pri la nuna situacio en Germanujo. Ĉu la raportoj ĉiam estas en akordo kun la realeco ? Ĉu ili ĉiam komunikas la veron ? Ĉu ili ne tre ofte enhavas malprecizajn, malverajn eĉ mensogajn sciigojn ? Vi, en via hejmlando, ne povas ekzameni propra-okule la detalajn cirkonstancojn ĉe ni, vi ne povas proprabuŝe demandi la germanan popolon pri la diversaj branĉoj de la ĉiutaga vivo. Eble elmigrintoj el Germ. troviĝas en via komunumo k vi havas okazon paroli kun ili. Ĉu ili reprezentas la germanan nacion ? Tute ne, *tre ofte la elmigrintoj estas en konflikto kun la kriminala kodo*[1] kaj la ŝtata prokuratoro serĉas k persekutas ilin. Ne atendu objektivajn novaĵojn el la buŝo de elmigrintoj. Ni eĉ scias, ke ili disvastigis krimajn raportojn pri la nuna nacisocialista registaro. Malfacile estas por vi formi justan opinion pri la nova Germanlando. Sed tiu ĉi justa opinio havas grandan valoron por ĉiuj germ. esp-istoj, kiuj arde amas sian patrujon kiel vi amas la vian, k pro tio ĉi ni petas vin, tralegu atente la sekvantajn liniojn, kiuj enhavas verajn informojn k poste juĝu mem. Cirkuligu ilin en via esp-ista rondo, parolu pri ili k vi fariĝos kunbatalanto por la vereco. — Skribu al nia adreso, por ke vi plue estu instruata pri la vera stato en nia lando. Tiel vi donos al ni la plej efikan rimedon, por pruvi al nia administrado la utilecon de nia ŝatata esperanto.

Kun esp.-salutoj

Esperanto-grupo de Frankfurt a-M (Germ.) Altegasse 41 ».

Vi esperantistoj laboristaj, eĉ burĝaj, ekster Germanio, havos okazon esplori la « kriminalan » karakteron de la politikaj elmigrintoj. Vi aliflanke ankaŭ konas la unuforman « veron » de la germanaj informorganoj. La veron komandas la propaganda ministro Gebels (Goebbels), k tiu, kiu ne kredas ĝin, interkonatiĝas kun la ekzekutisto Gering (Goering).

J. H.

[1] Substreko nia. — *Red.*

Jus aperis.

SKIZO PRI FILOZOFIO DE L'HOMA DIGNO

de

PAULO JIL (Paul Gille)

Profesoro ĉe la Belgia Instituto por Altaj Studoj

En la traduko de *E. Lanti*

kun antaŭparolo de l'tradukinto. Pli ol 150 pĝ. formato 127 × 187 mm. Prezo : 12 fr. frankoj. Mendu tuj la valoran k interesan verkon.

SAT, 23, rue Boyer, Paris 20.

LA JUNAJ AGLOJ

Iom pri infan- k junulorganizoj en Svedio

La estonto apartenas al la junularo. Tio estas vero neniam refutita. Tion ankaŭ atentis ĉiuj ideaj movadoj, kiuj volis certigi al si daŭran vivon. La burĝe naciaj organizoj estigis skoltmovadojn, por enplanti ĉe la junuloj konservemon al la nuna sociordo. Religiaj sektoj prenis en manojn la infanojn, por encerbigi al ili sian stulton. Neniu el tiuj movadoj celis evoluigi la infanojn al racia, fruktodona pensado. Ili estis indiferentaj pri kulturaj aferoj k eĉ kontraŭlaboris la celadon de la laborista movado. Ofte daŭras longan tempon, antaŭ ol tiel infektitaj junuloj vekiĝas al konscio pri socia respondeco, ĉar aliaj interesoj influis ilin dum la aĝo de facila perceptemo.

La laborista movado en Svedio pli frue ne sufiĉe atentis la gravon de tiu afero. Oni kontentiĝis, alligante la pliaĝajn junulojn al partia junularo, sed la infanojn k junulojn sub aĝo de 15-16 jaroj oni lasis al pastraj dimanĉlernejoj. La provoj fari ion datiĝas de la jaroj dum k post la mondmilito. La komunista partio organizis tiutempe pionirajn taĉmentojn, por veki klaskonscion ĉe laboristaj infanoj. Eble pro troa partieco ili ne havis grandan kapablon evolui; la gepatroj, kiuj estis anoj de aliaj tendencoj, ne sendis siajn infanojn tien. Alian, pli interesan provon faris la Junsocialista Klubo (anarkista) en Malmö dum la jaroj 1916-1917. Ĝi funkciigis liberan popol-lernejon laŭ la metodo de Francisko Ferrer. Bedaŭrinde la entrepreno ne longe vivis. Mankis ekonomia forto k komprenemo de laboristaj gepatroj k, kio estis ankaŭ tre grava, kompetentaj instruistoj.

En la jaro 1930 la soc-dem. junularo iniciatis fondon de junulorganizo nomata *Junaj Agloj* (svede : Unga Örnar). Ĝi ne estas partia, sed ĝenerale soci-radikala, kultura k praktika movado, formita laŭ skolta maniero. Ĝi celas « kunigi laboristajn infanojn al libera, celkonscia laboro por evoluigo de kolektiveco k solidareco, krei ĉe la junuloj komprenemon por kulturaj valoroj k scion pri sociaj aferoj k pri la gravo de la laborista movado en la formigo de justa sociordo. Per simplaj diskutoj k traktadoj ili kutimiĝos al kunvena ordo. Oni ne trudu al ili partitendencan doktrinecon, sed klopodu objektivan kleriĝon. » Aĝo por aneco estas 12-17 jaroj. La organizo havas proksimume 3.000 membrojn en 500 lokaj grupoj. Lokan grupon estras gvidanto k estraro elektitaj de la membroj. A.B.F. (Laborista Kleriga Asocio) kontrolas la laboron de Junaj Agloj. Ekskursoj k tendara vivo estas mlute praktikataj. Antaŭ kelkaj jaroj estis aranĝata infanrespubliko en Danio. Ĝin partoprenis junulorganizoj el Danio, Svedio k Germanio. Kun la dana organizo « Ruĝaj Falkoj » la interrilato estas vigla.

Por montri, kiel laboras Junaj Agloj, ni rigardu la lokan grupon en Malmö. Ĝi havas 200 membrojn en 4 sekcioj. En la grupo funkcias parolĥoro kun 50 membroj, muzika rondo kun 25 membroj, 2 studrondoj en hejma slojdo,[1] 2 studrondoj en kudrado ktp. por knabinoj, k laste, sed ne malplej grave, unu studrondo en esperanto kun 15 anoj. Por kompletigi sian kleriĝon, la junaj proletaj agloj bezonas esperanton. Kiam ili kreos la novan mondon, la sennacia spirito de nia lingvo k movado influos la kreataĵon, ke ĝi estu hejmo por la homaro.

La Marlelo.

[1] Artmetia laboro.

TEOREMOJ

La sekvantaj « teoremoj » estis origine verkitaj, por esti utiligataj propagande k varbe en la landaj lab. esp. gazetoj ; k fakte ili aperis nacilingve jam en la Sveda k la Nederlanda LEA-gazetoj. Tamen ni opinias, ke ankaŭ la K-doj, kiuj jam estas konvinkitaj pri la neceso de esperanto k de SAT, havos utilon trovi en tiuj ĉi « teoremoj » argumentadon k utilajn pensojn prezentitajn en plej preciza k konciza formo. — *Red.*

1) La senĉesa k nehaltigebla malvolviĝo de l'maŝinismo (permaŝina produktado k transportado) pli k pli alproksimigas la popolojn k interdependigas iliajn interesojn.

Konsekvenco. Tiu ekonomia interdependiĝo devigos la popolojn unuiĝi k kunfandiĝi.

* * *

2) Unu grava malhelpo en la unuiĝo de l'popoloj estas la subjektivaj fortoj, kiujn konsistigas malsamaj tradicioj k kulturoj, esprimataj per apartaj lingvoj.

Konsekvenco. Kvankam estante nesufiĉa rimedo por estigi unuiĝon inter la homoj, tamen komuna lingvo estas nepre necesa, por ke ili povu interkonatiĝi k poste unuiĝi.

* * *

3) Ĉiuj naciaj idiomoj estas tre komplikaj, nelogikaj k sekve tre malfacile lerneblaj.

Konsekvenco. Estus malsaĝe esperi, ke iu el tiuj idiomoj povus fariĝi la komuna lingvo de ĉiuj homoj sur la tero.

* * *

4) Ekzistas jam de kelkaj jardekoj artefarita lingvo, kiu estas kvazaŭ la kvintesenco de la grandaj kulturlingvoj ; ĝi nomiĝas *esperanto*, estas simpla, logika, facile lernebla, tre esprimoriĉa k jam disvastiĝis en ĉiuj mondpartoj. Esperanto fariĝis viva lingvo de vivanta popolo k solvis la problemon pri tutmonda inter-kompreniĝo.

Konsekvenco. Kiuj deziras efike k celkonforme batali por la unuiĝo de ĉiuj popoloj, tiuj havas la devon ellerni k praktikadi esperanton.

* * *

5) Per la praktikado de artefarita lingvo inter homoj el ĉiuj landoj disfalas la tradiciaj muroj, interpenetriĝas la diversaj kulturoj ; plie, per la senĉesa pliriĉiĝo de originala literaturo en esperanto kreiĝas nova, *sennacieca* kulturo ampleksanta la tutan mondon.

Konsekvenco. Sama kiel ĉe 4.

* * *

6) La klaso, kiu plej bezonas esperanton, estas la proletaro, tial ke ĝenerale la laboristoj estas nekleraj k ne havas kiel burĝoj la eblon lerni kelkajn fremdajn lingvojn.

Konsekvenco. Kiuj volas efike k celkonforme labori por la emancipo de l'proletoj, tiuj nepre devas propagandi, lerni k praktikadi esperanton.

* * *

7) Jam de 13 jaroj ekzistas proletendenca asocio, kies anoj estas unuigitaj per esperanto k ignoras inter si la landlimojn. Ĝi nomiĝas : *Sennacieca Asocio Tutmonda.*

Konsekvenco. Kiu deziras la starigon de senklasa, senlandlima socio, unuvorte la regadon de l'socialismo sur la tuta tero, tiu havas la devon aliĝi al tiu organizo, tial ke ĝi konsistigas la embrion de la estonta socio.

* * *

Kara leganto, kiel vi sendube scias, teoremo estas aserto, kiu bezonas demonstracion, por ke ties vero vidiĝu klare. Al vi mi lasas tiun taskon. Pripensu mem, rezonadu logike, konsekvence k mi estas certa, ke tiuj teoremoj fariĝos por vi, kiel ili estas jam delonge por mi, disvastigindaj veraĵoj, nepre obeendaj principoj.

E. Lanti.

Marŝo de « Junaj agloj »



Ni estas ĉiuj fratoj,
La ĉenon formas man' ĉe man'.
Tra tuta mondo sonas:
Al ĉiuj sun', al ĉiuj pan' !
Se la krueloj premas vin,
Sentiĝas ŝarĝoj punaj,
Komune ni ekportos ĝin,
La bravaj Agloj junaj.

Ne sentas ni malamon
Irante al batala cel',
Pro vundo ni pardonas,
Sed ne pro aĉa malfidel'.
Al ŝirmo de la senfortul'
Per fortoj ni komunaj
Ekiros kontraŭ perfortul'
Batale Agloj junaj.

Kuraĝe al la celo
Soldatoj bravaj marŝas ni,
Armilojn ne ni portas
En la batal' por novsoci'.
Eksonos flame en eston'
Pri homfrateco kantoj sunaj.
La devon faris ni ĉe l'front',
Ni ruĝaj Agloj junaj.

Tradukis La Martelo.

Legu en la maja kajero de

SENNACIECA REVUO

interalie : Unua de Majo. — Letero pri neleĝeca laboro en Germanio. — El Aŭstrio, ktp, ktp.
16 paĝoj. Ilustrita.
Abonu k abonigu al « S.R. ». Speciala tarifo por SAT-anoj.
Unuopa kajero : 2.25 fr. fr.
SAT, 23, rue Boyer, Paris 20.

Por averto !

La eks-k-do *J. Pešek*, Plzen, kiel peranto ricevinte niajn varojn, ŝuldas al SAT de pluraj jaroj konsiderindan sumon, el kiu restas ankoraŭ nepagitaĵo de 288.60 *fr. frankoj*. Malgraŭ multfojaj admonoj, eĉ rekomendite senditaj, Pešek nek respondis nek pagis.

Anonco :

Esp.-studrondeto aranĝos letervesperon la 23-an de majo. Eksterlandaj Gekdoj, skribu al ni ! Ni certe respondos. Adr.: *K-do Martin Karlsson*, Separator. *Tullinge* (Svedio).

A.D.L.E.L.

La kompostado de la dua, tre ampleksa libro (*Jimmy Higgins*) estas mendita. Ni petas ĉiujn ADLEL-anojn, nepre kiel eble plej baldaŭ pagi la duan partopagon, por ke finance nia entrepreno povu funkcii sen malhelpoj !

Nia poŝto

77. — Mono k let. ricevita ; ankaŭ la pli fruaj leteroj.
16.202. — La versoj bezonigas profundan refaradon ; ni provos. Nek akuzativon, nek pluralon oni rajtas apostrofi ; nur la nominativan «o»-finaĵon. *Red.*

Granda nombro da kurspartoprenintoj deziras praktiki esperanton per serioza korespondado. Je la fino de majo ni aranĝos korespondvesperon k honeste respondos al ĉiu, kiu sendis leteron aŭ bildkarton. Adresu : *F. ten Hagen*, De Kempenaerstr. 58, I, *Amsterdam*, Nederlando.

Ekster nia Movado

La sveda reĝisoro Sandra Malmkvist lernas kun siaj dek-kvin geaktoroj esperanton, por prezenti la modernan svedan teatran arton dum rondvojaĝo tra la landoj de Eŭropo en esperanto. (En la programo estas nur verkoj de Ŝekspiro.)

Leono Zamenhof, frato de la aŭtoro de esp-o, mortis kelkajn monatojn post la morto de alia frato Zamenhofa, Felikso.

La grava germana ŝipkompanio « Norddeutscher Lloyd » eldonis en esperanto luksan prospekton pri siaj ŝipvojaĝoj dum la jaro 1934. La prospekto entenas programon k veturplanon por 20 grandaj societaj vojaĝoj.

En la plej disvastigita norvega infangazeto (*Norsk Barneblad*) aperas esp. kurso.

En Hindo-Ĉinio (*Hanoj*) 20 kriminalpolicistoj lernas esp-on ; du konataj hindo-ĉiniaj gazetoj enhavas regulan esp. rubrikon.

Internacian letervesperon aranĝos Esp.-Klubo de Skövde la 7-an de majo. Ni atendas leterojn k poŝtkartojn el la tuta mondo. Nepre ni respondos ! Adresu al : « Glacijunulino » aŭ « Neĝjunulo », K-do *L. Aberg*, Poŝtfako 21. *Skövde* (Svedio).

Recenzejo

E. Lanti : *L'Espérantisme prolétarien (Laborista Esperantismo)*. Tradukis el esperanto *R. Gilbert*. 48 pĝ. Form. 12 × 18. Prezo : 2.50 fr. Eldonis : Fédération Espérantiste Ouvrière, 115, Bd. Aristide-Briand, *Montreuil* (Seine), Francio.

Jen la *franca* traduko de la konata esperantlingva varb-broŝuro, kiu jam antaŭe aperis en angla, sveda, holanda, germana k ĉeĥa tradukoj. La teksto mem estas antaŭita de « averto de la tradukinto », kiu skizas en kelkaj paĝoj la historion de la broŝuro, ĝian malpermeson en Sovetio, signalo al skismiga agado en la ĝis tiu dato unuece restinta SAT, k citas la juĝojn tre laŭdajn pri la verketo de diverslandaj K-doj (inkluzive iuj el Sovetio). Ni estas konvinkitaj, ke la novaperaĵo utile helpos rekruti en franclingvaj regionoj anojn por nia movado, por FEO k SAT. *N. B.*

RADIO-PROGRAMO

25.4. : Brno, 325 m., Praha k. a. ĉeĥaj stacioj (22.30-23.25), esp. horeto.
26.4. : Minsk, 1442 m. (22.05-22.20), *same*: 28.,30 4., 2., 4., 6.5.
27.4 : Leningr., 1224 m., (22.45-23.15), *same* 30.4 (unumaja koncerto), 3.5.,6.5.
28.4. : Brno, 325 m. (17.15-17. 25), *same* : 5.5. ; Zagreb, 276 m. (18.30-18.45)

Atentu, Gek-doj !
K-do *M. Monléon* (desegnisto proleta), str. Dr. Sumsi 27, *Valencia* (Hisp.), bezonas por revolucia arto malnovajn ekzemplerojn de l'revuo AIZ. k aliajn revol. ilustritajn gazetojn. Kiu povas ilin sendi ? Mi ankaŭ korespondos kun desegnistoj k pentrartistoj ĉiulandaj serioze k regule, pri arto, sociologio, ekonomio, ktp. **Mi certe respondos.**

AL VALENCIO !

Pli ol 60 holandaj Gek-doj jam anoncis sin por la aŭtomobilvojaĝo al Valencio. Ankau kelkaj svedaj K-doj aliĝos al la holanda karavano. Ni traveturos i. a. Antverpenon, Bruselon, Namuron, Dinanton, Karolvilon, Sedano, Verduno, St. Mihielon, Novkastelon (Neufchâteau), Langres, Diĵono, Châlons-Saône, Tournus, Macon, Valence k Avinjonon. Se en tiuj urboj loĝas espistoj, kiuj povas iel helpi, mi afable petas ilin skribi al K-do *C. J. v. Veenendaal, West-Graftdijk* (Nederlando).

Por 5 fr. frankoj (*unu svisa fk.*)
vi povas ricevi *centon* el la novaj *SIGELMARKOJ* de SAT, kiuj rilatas la Valencian Kongreson. Tre artaj, plurkoloraj.
SAT, 23, rue Boyer, Paris 20.

Memornoto

Represis el « Senn. Revuo » : *De Arbeider* (anark.), Amsterd., 10.3., La sovetia Robinzono (krome priesp-a materialo).

Represis el « S-ulo » (en nacilingva traduko) la artikolon de N.B. en jan. : *Le Travailleur Espérantiste* (marto), *Nia Bulteno*, Los Angeles (n.-o 8).

Priesper. artik. k notojn enhavis : *Brand*, Stokh. 24.3. (rubriko), *Signalen*, Stokh., 8., 15., 22., 29.3. ; *De Fakkel*, Amsterd., 9., 13., 20., 23.3. ; *Lokomotivmännens Tidningen*, Stokh., 1.3. (longa artik. en esp-o pri K-do Lanti) ; *Nieuwe Apeldoornsche Courant*, 10.3. (SAT-Kongreso Stokh., portretoj Ozre-Gallo).

Korespondadon per leteroj aŭ poŝtkartoj k interŝanĝon de poŝtmarkoj deziras juna svedo. Adreso : *Erik Sörqvist*. Furuvägen 143. Fullersta. *Huddinge* (Svedio).

LA PLENA VORTARO, 2-a *eldono*, plej grava verko, necesa al ĉiu serioza esperantisto, aperos
en la komenco de majo. SAT.

Korespondado

Argentinio :
K-do *Celedonio San'os*, str. C. Pellegrini 238, *Buenos Aires*, dez. koresp. pĉt., nur kun Afriko, Azio, Oceanio.
K-do *B. Berger*, str. Cucha Cucha 2364, *Buenos Aires*, dez. interŝ. L., P.M. pri ĉt. kun ĉl., certe respondas.

Germanio :
21-jara germaniano biciklos al 14-a SAT-kongreso. Kiu el Germ. aŭ najbara lando kunveturos ? Gek-doj ! Tuj skribu al S.A.T. !

Nederlando :
Du 14-jaraj K-doj senpolit. de mezgrada lernejo dez. kor. prefere kun samaĝuloj ĉl. Adr. *A. Overbeek k K. Citroen*, Zonneplein 21, *Amsterdam*.
K-do K. A. Hoogerwerf Jr.. Cabotstr. 10, *Amsterdam-W.*, dez. koresp. kĉl. pri literaturo k politiko.
Lernanto de esperanto serĉas koresp.-antojn el ĉl. Certa resp. K-do *N. Vergunst*, Joh. de Breukstr. 11, *Haarlem*.

Nederlando
25 ge-anoj de nia grupo dez. koresp. kun Gekdoj ĉl. pĉt. Resp. gar. Skribu al : *R. Maarsen, 4 de Kade 121, Gouda.*

Deziras korespondi kun Gek-doj en *Valencio* pri la SAT-kongreso k pri la urbo Valencio K-dino *Timmers*, Rosend. str. 246, *Arnhem* (Holando), prefere kun K-dinoj, k K-do *A. Henstra*, St. Peterl. 52, *Arnhem* (Holando) (ankaŭ pri aliaj aferoj). Certe resp. Ne skribos unue.